

N-ro 181-Dicembro-2004 (4)



**Lebuser Land**  
Eine Brücke in Europa

# La Migranto

Naturamika Internacio  
Esperanto-Fako TANEF

# La Migranto

*Ligilo de la Esperantistaj Naturamikoj.  
Eldonita kun aprobo kaj interkonsento de la Naturamika Internacio.*

Eldonanto TANEF  
Apermonatoj  
marto, junio, septembro, decembro.

Redaktofino  
ĉiam la 1an de la antaŭa monato.

Naturamika Internacio-NAI  
Gen. Sekretario: vakas  
Diefenbachgasse 36, A-1150 Wien, Aŭstria

Internacia fakreferanto :  
Vakas.

Ĉefredaktoro: Antje Noordewier-Jagtenberg  
Emmalaan 7, NL-3832 AH Leusden, Nederlando  
Retadreso: [bart.noordewier@12move.nl](mailto:bart.noordewier@12move.nl)

Redaktoro: Erna Döring  
Klingelbergstr.11, CH-4056, Basel Svislando.

Redaktoro / Korektanto: Bert de Wit  
Houtvaartkade 21, NL-2111 BR, Aerdenhout,  
Nederlando.

Retadreso: [aif.dewit@wanadoo.nl](mailto:aif.dewit@wanadoo.nl)

La aŭtoroj mem respondecas.

Kasisto/abonanto-administracio :  
Eric Baert, Rue des Taillis 23  
BE-1420 Braine L'Alleud BELGIO.  
ĝirkonto: n-ro 7543982 nome de "La Migranto"  
Rue des Taillis 23, Braine L' Alleud BELGIO.

Reteto : [eric.baert@swing.be](mailto:eric.baert@swing.be)  
Pagoj el eŭrolandoj sub mencio de Iban-nro :  
Konto La Migranto NL 77 PSTB 0007543982  
BIC:PSTBNL21

UEA-konto tanf-a  
Vi ne uzu la vorton "kotizo" aŭ "abono" sur  
via pagilo por eviti imposton. Se eble pagu al  
via landa peranto. La adreson vi trovas ĉiujare  
sur la koloraj paĝoj en la 4-a n-ro de  
La Migranto. Jarabono € 10

Presisto:  
Grammé, Amersfoort, Nederlando.

Ĉi tiu gazeto estas presita sur medioafabla  
papero sen kloro.

## Recivitaj gazetoj, revuoj, k.a.


Esperanto, la verda stello '94 : 27, 28  
Esperanto UEA : 173, 174, 175  
Horizontaal 4/6  
Internaciisto 5  
Internacia Fervojoisto: 4, 5, 6  
Kajero el la Sudo: 64  
La Kancerkliniko: 112  
La Kromkancerkliniko : 19  
Katolika Esperantisto : 186  
Le Monde de l' Espéranto : 546, 547  
Norvega Esperantisto : 4, 5  
La Sago, la SAT-Amikara gazeto : 7, 8,  
9, 10  
Sennaciulo SAT : 1190, 1191, 1192,  
1193  
La Verda Proleto : 425

## Enhavo :

Raporto pri la TANEF kunveno dum  
Faulhaber Semajnfino : Ĉinio 3,4  
La malkovro de Lebusera lando 5  
La botaniko de la deziroj 6,7  
Plantoj kiuj resanigas la teron 8,9  
Elfo de rozo ; Du samtempuloj 10,11,12  
13,14  
La birdoj en mia regiono 15,16

## Bildo sur la frontpaĝo :

La urbodomo en Oŝno Lubuskie  
(Pollando)



## RAPORTO PRI LA TANEF- KUNVENO DUM FAULHABER SEMAJNFINO

La kunveno okazis je sabato la 23a de oktobro en Elspeet, dum la Faulhaber-semajnfino kiun organizis Esperanto Nederland.

Ĉar oni havis plenplenan programon finfine Aat de Jong akiris la eblon kunveni inter 17.15 kaj 18.—h. antaŭ la manĝo en aparta salono.

Aat de Jong gvidas la kunvenon de 15 personoj, inter kiuj ne ĉiuj estis abonantoj de La Migranto. Li klarigas ke li partoprenis kunsidojn de la landa naturamika movado, sed ke tiu momente estas reorganizata pro deficino. Stagnas la internaciaj kontaktoj.

Oni raportas pri aktivecoj de naturamikaj esperantistoj. Bedaŭrinde ne povis okazi internacia diskutprogramo pri la pligrandiĝo de Eŭropa Unio en aprilo ĉi jare. La sekcio Haarlem de la nederlanda naturamika movado helpis en la preparado de la kunveno, en kiu oni per komputiloj kaj retkameraoj interŝanĝis opiniojn pri kvar demandoj rilate al EU. Sed pro manko de aliĝantoj tiun kunvenon oni nuligis. En Almelo, Inge de Bruin estas en laborgrupo de loka naturamika sekcio. En Antverpeno, la esperanto-sekcio de la naturamikoj kunvenas en la Hobokena klubejo, ĉar la malnova klubejo de Deurne estas fermita pro rekonstruo.

Aat de Jong proponas ke ni kunlaboras al la preparado de bicikla itinero internacia, "Amika Vojplano" tra 10 landoj en Eŭropo. Oni en julio diskutis tiun planon por nova bicikla itinero en Heerlen, sed bezonas ideojn por realigi ĝin. Ĉu esperantistoj povos helpi en tio, estis la demando. Biciklajn vojojn en propra regiono oni povas priskribi kaj tiam oni povas kunligi la itinerojn. Oni bezonas junajn homojn por fari tion. Oni sugestas peti helpon al BEMI, la biciklista asocio esperantista. Eble ili jam disponas pri materialo. Je la argumento de Aat de Jong ke li nur demandas la diversajn fakreferantojn, oni akceptis.

Por nederlandaj abonantoj de la Migranto validas ke ili povas simple pagi al la antaŭa ĝirkonto de la Migranto kaj tiam la mono iros al la kasisto. Laŭ sugesto de Stella de Weerd, oni esploros ĉu kelkaj homoj pretas esti en kaskontrola komisiono.

Pri la situacio rilate al nova internacia fakreferanto oni konstatis ke NAI jes promesis meti la punkton sur la tagordon de la prezidanta konferenco, sed ni nenion plu aŭdis. Oni sugestas peti al Francisko Degoul ĉu eble li pretas fari tion.

Oni ŝatus ke en venontjara programo de Faulhaber-semajnfino estu promenado en la ĉirkaŭaĵo. Ĉar oni ankoraŭ ne certas pri la loko (povas esti ke

okazos aparta jubilea kongreso nederlanda en la ĉirkaŭaĵo de Roterdamo), oni ne povas tuj peti tion.

Post la kunveno okazis telefon-alvokoj. Stella parolis kun Eric Baert (pri kaskontrolo) kaj kun Francisko Degoul (pri eventuala kandidatiĝo por internacia fakreferanto). Estis aranĝita kaskontrolo je la 3-a de marto 2005 en Antverpeno, krom Stella de Weerd kaj Eric Baert ĉeestis René Geivaerts. Ŝi ankaŭ telefonis al Francisko Degoul, li ĵus emeritiĝis kaj estas membro de la naturamikoj, aktivante en diversaj grupoj, i.a. ankaŭ la esperanto-grupo. Tamen li diris ke li bezonas certe 5 monatojn por alkutimiĝi al la nuna stato en sia persona vivo kaj en la naturamikaj grupoj. Do tial li nun ne akceptus kandidatiĝi, sed eble poste, se li ankaŭ scias pli pri kio signifas esti internacia fakreferanto.

La nova kandidato por la funkcio devas esti prezentata de landa sekcio de la naturamikoj.  
BW

## ĈINIO, LINGVO KAJ SCIENCO.

En faka gazeto por biologoj mi legis artikoleton pri la scienca disvolviĝo en nuntempa Ĉinio. En la ne tro fora pasinteco tuta generacio da intelektuloj estis forŝovata dum la Kultura Revolucio. Laŭ la aŭtoro, la lingva problemo estas grandega obstaklo en

ĉiu internacia aktiveco. En internaciaj kongresoj oni regule vidas ĉinajn sciencistojn kiuj eligas nur serion da nekompreneblaj sonoj, akompanate de Powerpoint-dia-pozitivoj en terura anglaĵo. La uzado de artikolo kaj verbaj konjugacioj estas malfacile lernebla, pro kio manuskriptoj el Ĉinio ofte ŝajnas nelogikaj kaj malprecizaj. La malofta okcidenta scienculo kiu laboras en Ĉinio, kelkfoje povas la tutan tagon redakti la gramatikajn ruinaĵojn de kolegoj. Krome, Ĉinio havas ekstreme hierarkian kulturon. Instruistoj havas altan statuson. Estante studento, oni aŭskultas kaj ĝentile silentas. Tio estas granda bremsilo je la anstataŭigo de malnovaj ideoj per novaj.

Tamen mi konvinkiĝis post intervjuoj kun dekoj da ĉinaj scienculoj, ke ili furoros. Tio estas pro tio ke, dank'al aktiva instiga politiko de la registaro, ĉiam pli da Ĉinoj revenas al sia patrio. Laborinte dum kvin aŭ dek jaroj eksterlande, tiuj en mallonga tempo komencas aerumi la sciencajn litojn.

La revenintoj ĝenerale bone parolas la anglan, havas kontaktojn en la tuta mondo kaj scias kiel oni publikigas en deca revuo. En la ĉinajn laboratoriojn ili enkondukas neformalan etoson kiu ebligas kritikeman pensadon.

**Ne forgesu ke La Migranto apartenas ankaŭ al vi kaj ĉiam bezonas viajn artikolojn !**

Gazetara teksto – NFI, la 19-an de oktobro 2004.



## La malkovro de “La Lebusera Lando ” por la medio- kaj vojaĝantoj.

Sub ĉi tiu titolo okazis je la 16a de oktobro 2004 en Oŝno Lubuskie (Pollando) la finiĝo de la projekto “ Eŭropa Pejzaĝo de la jaroj 2003-2004 ”.

La alvojaĝon oni faris el Miedzyrzecz per mem aranĝita nostalgita vaportrajno kiel simbolo por la rekonstruo de regiona vagonara trafiko. La ĉefa celo de ĉi tiu kunveno en la urbodomo de Oŝno estis la prezentado de la proponoj kaj postuloj, kiuj estis prilaboritaj dum la dujara agado de komunaj lokaj reprezentantoj de politikaj kaj privataj laborgrupoj, seminarioj kaj konsilantaroj.

La fokuso de la proponoj kaj postuloj estas la rekonstruo de translima ekologia kaj kvieta turismo en la tuta Lebusera regiono.

La impona naturbeleco kaj la miriga kulturo de la translimaj regionoj, ambaŭflanke de la rivero Oder, oferas la bazon por la konstruo de temo-orientiĝaj biciklaj kaj promenaj vojoj. Por traveturi la tutan Lebuseran Landon, oni tamen bezonas unualoke diversajn pontojn kaj pramejojn por ebligi la transiron de la rivero. La publika transporto trajna aŭ aŭtobusa devus esti plivastigita kaj iam finiĝintaj trajnaj interligoj estu refunkciotaj.

La finan dokumenton, enhavantan ĉiujn proponojn kaj postulojn, oni povas rete akiri senpage ĉe NFI je [www.nfi.at/ldj](http://www.nfi.at/ldj). Kadre de la daŭra disvolviĝo de la Lebusera Lando la Naturamikoj restos tie agemaj i.a. per la projekto Naturo kaj Kulturvojoj. Ĝis la fino de 2005 oni projektos entute 12 translimajn vojojn por biciklantoj kaj promenantoj.

Dum la somero 2005a oni refoje planas la sukcesplenan rondiron : “ Ekskurso de l’horizonto, modelvojaĝo por ekologia kaj milda turismo ”.

Krome per pli granda projekto oni kunligos per la tiel nomataj amikecaj biciklovojoj ĉiujn Eŭropajn Pejzaĝojn de la Jaroj. Per tio ekestu granda vojaĝregiono laŭlarĝe tra la tuta Eŭropo.

Por daŭrigi la laboron en la Lebusera Lando, la Naturamikoj proponas formi forumon “ Amikoj de la Lebusera Lando ” por interŝanĝi opiniojn kaj ideojn.

*Esperanta traduko : Aat de Jong, Nederlando.*



## LA BOTANIKO DE LA DEZIROJ

*Michael Pollan, Eldonejo  
Prometheus, 2003.*

Pasintjare mian scivolon vekis libro en la librovendejo de la universitato de Twente (en la orienta parto de Nederlando). Eble pro la librokovrilo kun tulipo, pomo, kanabofolio kaj terpomo. Eble pro tio ke mi ne povis bone kompreni la titolon. Verŝajne oni malbone tradukis la titolon, tiel ke en la nederlanda oni povus kompreni "botanikistino". Sed envere temis pri botaniko.

La priskribo de la enhavo de la libro pliigis la scivolon. Temis pri historio de kultivitaj plantospecioj, el la vidpunkto de la planto rakontita. La aŭtoro, usona s.ro Pollan, opinias ke ĉi tiuj plantoj estis tiel sukcesplenaj ĉar ilia postviva strategio estas bazita sur la plenumo de la plej bazaj deziroj de la homo.

La pomo satigas la bezonon de la homo je dolĉeco, precipe en tempoj kaj regionoj kiam kaj kie mankis sukero. Mariĥuano donas eblecon de narkotiĝo, la terpomo estas malmultekosta nutraĵo.

Estas iom amuze atribui al plantoj strategion, ĉar tio estas vorto kiu indikas konscion, sed se oni pensas en terminoj de variado kaj selektado kaj kunevolucio de homo kaj planto, oni povas kompreni la frazon.

Estas tre amuzaj, interesaj rakontoj kaj anekdotoj en la libro.

Ekzemple la rakonto pri la legenda s.ro Johnny Appleseed (Chapman estis la vera nomo) kiu ĉiam sur la fronto de la koloniistoj en Usono dissemis siajn pomsemojn kaj tiel provizis la koloniistojn per pomarboj. Inter tiuj kompreneble estis ankaŭ tute novaj rasoj kun neatenditaj kvalitoj. La pomon oni kultivis precipe pro la dolĉeco. Koloniistoj estis malriĉaj, kansukero en tiuj tempoj devis esti importata de foraj landoj. La pomojn oni cetere uzis por produkti cidron, multe pli facile produkteblan ol maĵa brando. Dum severaj frostoj la cidro transformiĝis en fortan alkoholaĵon, ĉar la akvo frostiĝis. Tio nomiĝis Applejack.

Planti pomarbaron estis ceremoniaĵo de la pioniroj en Usona sovaĝa okcidento. Johnny Appleseed estas adepto de la t.n. Svedenborg-doktrino kiu instruas ke ĉio surtere havas kontraŭaĵon en la posta mondo. La pejzaĝo, la plantoj kaj bestoj ne estis malamikaj al homoj, sed simontrio de Dia bonvolo. Li vivis kiel ermito en la arbaroj kaj migris sur nudaj piedoj tra la lando, kelkfoje per kanuo. Johnny estis figuro kiu vojaĝis inter sovaĝejo kaj civilizo, kiu estis viro kaj virino, homo kaj dio samtempe. Tia figuro similas al Dionizo, la greka Dio, kiu trarompas la fiksayn limojn inter naturo kaj kulturo. Dionizo kiel Dio de

bakĥanaloj kontraŭe al Apolono, Dio de la belartoj.

La rakonto pri la tulipo indikas ke la tulipo estas ekzemplo de Apolona beleco: geometria, rekta. Sed ĝuste en la komencaj jaroj de la deksepa jarcento la allogo de la tulipo kuŝis en la kapricaj flamaj ekzempleroj, kiuj neniam estas samaj. Ni nun scias ke tiuj flamoj estas sekvo de virusa infekto de la planto, sed tiutempe oni pagis grandegajn monsumojn por "Rembrandt-tulipo". La tuta tulpomanio en Nederlando, kiu abrupte finiĝis en 1637, ne estas tute klarigebla per la fascino por la bela floro. Tulpomanio similis al mezepoka karnavalo en kiu la tuta socia ordo estas renversigita. Fakte estis rito de permesita frenezo kaj liberigo, tipe Dioniza fenomeno.

Gravan rolon por inciti la posedemon de la Holandanoj ludis s.ro Carolus Clusius kiu en 1593 venis al Lejdeno kaj kunportis tulipajn bulbojn. Li vendis la bulbojn al neniuj, eĉ ne kontraŭ oro. Tial oni ŝtelis la tulipojn meze en la nokto. Tiel la tulipbredado disvastiĝis ekster la ĝardeno de s.ro Clusius (Kluzio).

En alia rakonto en la libro, pri la terpomo, variaĵo de tiu okazintaĵo estas menciita. La franca reĝo ja volis importi terpomojn en Francio, sed la terkultivistoj ne konis la kreskaĵon kaj sekve ne volis kultivi ĝin. Estis tre ruze

kiam la reĝo Ludoviko la XVI-a malpermesis la vendadon de terpomoj kaj diskonigis ke ili estas kultivataj en kampo apud Parizo. Tre rapide la terpomojn oni ŝtelis kaj tiel Francio ekkonis la terpomon.

Terpomoj komence en Britio havis la renomon de nutraĵo por la malriĉuloj, pro tio ke ili estis multe malpli kostaj ol tritiko. Tio ŝanĝiĝis kiam la grenrikolto en la Britaj insuloj fiaskis en 1794. Sed ankaŭ la terpomon trafis katastrofo, kiam en 1845 en Irlando, verŝajne pro importitaj terpomoj el Sud-Ameriko, la Phytophthora-fungo detruis la rikolton kaj kaŭzis grandegan elmigradon al Usono.

Ke Mariĥuano apelacias al niaj Dionizaj bezonoj, ne bezonas klarigon. Kiø estas interesa, estas la fakto ke malpermeso en Usono kondukis al grandega selektopremo favore al plantoj kiuj produktas grandan procentaĵon de kanabinolo (eĉ 15%), la ĉefa efika substanco en la rezinaĵo de la planto. En la naturo tio neniam spontanee povus okazi. Antaŭ nelonge oni povis legi en la ĵurnalo ke nuntempe oni kultivas en Kolombio kokaino-plantojn kiuj produktas multe pli ol la sovaĝaj plantoj...

Nu, restas fascina tiu interagado inter plantoj kaj homoj. Kiel ili reagis unu al la alia. La plantoj ne povas paroli, sed supozu ni ke ili ja havas strategion....

B.W.

## PLANTOJ KIUJ RESANIGAS LA TERON

Jam estis konate ke kelkaj plantoj en la naturo enhavas pli da kelkaj kemiaj substancoj ol en la ĉirkaŭa medio estas. La malgranda planto aliso, kiun oni kelkfoje kultivas en rokĝardenetoj, kolektas ekz.e nikelon el la grundo. Ĝis 2% de la substanco seka de ĝiaj folioj povas esti nikelo. Tiu planto povas eĉ esti ekonomie interesa, ĉar la planto nature ekstraktas la nikelon el la tero, dum per kemia procedo oni bezonus elektran energion por ekstrakti la nikelon el erco.

Oni povas sin demandi ĉu la planto ne suferas pro tiu akumulado de peza metalo. Sed ne, ĝi kreskas plu. Estas proteinoj en la ĉeloj kiuj fiksas la nikelon kaj transportas la nikelon al certaj lokoj en la plantoĉeloj, la vakuoloj.

Arseno estas alia konata peza metalo kiu estas toksa por homoj.



*Uleksoarbusto*

Sed iuj plantoj vivas sur grundoj kiuj enhavas ĝis 17 gramoj da arseno je kilogramo da minrest-

aĵo. Nekredeble toksa por homoj, sed iuj herboj, gresospecio kaj uleksoarbustoj, povas toleri tion. Kiel ili sukcesas? La sekreto estas en la genoj kiuj produktas enzimon, kiu transformas arsenon en arseniton. Tiu substanco estas tiam fiksita al malgrandaj proteinoj kaj tiel sendamaĝigita. La filiko *Pteris vittata* kolektas en mallonga tempo grandajn kvantojn da arseno en siaj folioj.



*Violeto.*

Plantoj kiuj toleras zinkon ankaŭ ekzistas. Estas eĉ violeto kiu kreskas en zinkhavaj grundoj. Tiu ankaŭ havas specialan sentoksigan mekanismon. Kolzo kaj sunfloroj povas ankaŭ kolekti sufiĉe da toksaj metaloj kiaj zinko, kadmio, plumbo, kupro kaj arseno el la grundo.

Kolzo plej bone povas koncentri kadmion el la grundo. La semoj de tiaj plantoj ne enhavas la toksaĵon, do povas esti uzataj por produkti oleon. Tio estas interesa metodo por koncentri la pezajn metalojn el malpurigitaj terenoj. Kaj ekzistas sufiĉe da tiuj terenoj



# ADRESARO 2005

Naturamika internacio

Internacia sekretariejo  
Diefenbachgasse 36  
AT-1150 Wien- Aŭstrio

## T A N E F

**Internacia fakreferanto:**

**vakas**

**Presado de "la Migranto"**

Presejo Grammé  
Postbus 287  
3800 AG Amersfoort, Nederlando

**Ĉefredaktorino :**

Antje Noordewier-Jagtenberg  
Kon. Emmalaan 7  
NL-3832 AH Leusden, Nederlando  
Ret adreso: bart.noordewier @ 12 move.nl

**Redakorino:**

Erna Döring  
Klingelbergstasse 11  
CH-4056 Basel, Svislando

**Redaktoro kaj korektanto:**

Bert de Wit  
Houtvaartkade 21  
NL-2111 BR Aerdenhout, Nederlando  
Retadreso: [ajf.dewit@wanadoo.nl](mailto:ajf.dewit@wanadoo.nl)  
La redakcio volonte ricevas komunikojn kaj artikolojn, ĉu surpapere, ĉu rete.

**Kasisto/abonanto-administracio:**

Eric Baert  
Rue des Taillis 23  
BE-1420 Braine L'Alleud, Belgio  
Retadreso : [eric.baert@swing.be](mailto:eric.baert@swing.be)  
Al li vi bonvolu sendas ĉiujn adresŝanĝojn, novajn abonojn aŭ finabonojn.  
Ĝirkonto 7543982 Postbank Nederlando  
nome de La Migranto.  
Braine L'Alleud, Belgio.  
Pagoj el eŭrolandoj sen bankkostoj nur sub mencio de Ibann-ro : konto La Migranto NL PSTB 0007543982 BIC :PSTB21  
**UEA-konto tanf-a.**  
*Vi ne uzu la vorton "abono" aŭ "kotizo".*



# FAKREFERANTOJ kaj PERANTOJ.

## AŬSTRIO

<b>Peranto:</b> Anton Straif Siedlerstrasse 14/E AT-4300 St.Valentin	<b>Pagu al:</b> € 10,00 Anton Straif, sama adreso Raiffeisenkasse St.Valentin-Haag Bankleitzahl 32789 <b>Konto-nr.32.043.226</b>
---	--

---

## BELGIO

<b>Fakreferanto:</b> Valonio kaj Flandrio Eric Baert Rue des Taillis 23 BE-1420 Braine L'Alleud Rete: eric.baert@swing.be	<b>Pagu al:</b> € 10,00 Eric Baert, sama adreso  Bankkonto nr. 271-0265305-42
--	--

---

## BRITIO

<b>Peranto:</b> P.Hewitt 26, Highfield Road North Thoresby, Grimsby South Humberside DN36 5RT	<b>Pagu al:</b> GBP 7,00 P.Hewitt, sama adreso  P.O ĝiro 24 118 9004
---	---

---

## BULGARIO

<b>Peranto:</b> Dimităr Ivanov Kalčev Ĵ.K.Javorof 13-2 B.G-1124 Sofio	<b>Pagu al:</b> BLG 5,00 Dimităr Ivanov Kalčev, sama adreso Limdato por abono 15-1-2005 Pri la konto, informiĝu ĉe la peranto.
--	---

---

## ĈEĤIO

<b>Peranto :</b> Václav Stiburek J.Franka 1731 CZ-256 01 Benešov u Prahy	<b>Pagu al :</b> ĈZK 110,00 Václav Stiburek Sama adreso Giro 122443440/0300
---	--

## FRANCIO

**Fakreferantoj:**  
 Monique Rouyre  
 10 rue Emile Cordon  
 FR-93400 Saint Ouen

**Pagu al la kasistino** € 10,00  
 Aurore Casanova  
 25 rue de Bourgogne  
 FR-94440 Villecresnes  
 Poŝtkonto Esperanto-Migranto  
 2 076 05 N Paris

**Côte Atlantque :**

George Menossi, Place de l'Ésperanto  
 Rue des Montfortains 17, FR-79160  
 St. Pampain.

**Alsace-Franche-Conté-Bourgogne-  
 Champagne-Ardennes, Normandie  
 Provence,Côte d'Azur**

vakas

## GERMANIO

**Federacia Fakreferanto :**

Lothar Eckert  
 Im Kirchspitzen 4  
 DE-76448 Durmersheim

**Pagu al :** € 10.00

Rolf Beau  
 Eisser Kirchweg 18  
 DE-27333 Schweringen  
 Volksbank Grfsch.Hoya eG.  
 BLZ 256 635 84  
 Konto: 705 447 520  
 Atentu la aldonan folion de la banko!

**Landaj Fakreferantoj :**

**Badeno-Virtembergo :** Lothar Eckert. Im Kirchspitzen 4, DE 76448 Durmersheim  
**Berlino:** Ulrich Wilke, Hufelandstrasse 31, DE 10407 Berlin.  
**Hesio:** Annelies Rudolf, Dachsbergerstrasse 1,  
 DE 34225 Baunatal.

**Rejnlando-Vestfaliao:** Vakas.

**Malsupra Saksio:** Vakas.

**Saksio-anhaltio:** Siegfried Linke, Fischerstecherstrasse 23, DE 06120 Halle.

**Slesvigo-Holstinio:** Vakas.

## HISPANIO

**Peranto:**  
 Luis Serrano Pérez

Font Nova 32  
 ES 08202 Sabadell

**Pagu al:** € 10,00  
 Luis Serrano Pérez, Banko de Sabadell  
 n-ro 0081 0900 82 0006712480  
 Estas necese, ke vi post pago  
 avertu s.ron Pérez.

**ITALIO**

**Peranto:**  
Carla de Lorenzi  
Via boston 65  
IT 10137 Torino

**Pagu al:** € 10,00  
Carla de Lorenzi, sama adreso  
Ĝirkonto nekonata,  
informiĝu ĉe la perantino

**NEDERLANDO**

**Fakreferanto:**  
Aat de Jong  
Vedelstraat 14  
NI 2287 BK Rijswijk

**Pagu al:** € 10,00  
Eric Baert  
Ĝirkonto 7543982, Postbank Nederland,  
nome de La Migranto, rue des Tailis 23,  
BE-1420 Braine L'Alleud, Belgio

**SLOVAKIO**

**Peranto:**  
Miroslav Zavodsky  
J.Zavodskoho 67  
SK 01004 Zilina 4 (Zavodie)

**Pagu al:** SKK 115,00  
Miroslav Zavodsky, sama adreso.  
Konto nekonata.  
Informiĝu ĉe la peranto.

**SVEDIO**

**Peranto:**  
Pelle Persson  
Svartviksvägen 14  
SE 123 52 Farsta

**Pagu al:** SEK 90,00  
Pelle Persson, sama adreso  
Ĝirkonto 68 41 61-3  
Nepre indiku L.M.2005.

**SVISLANDO**

**Perantino :**  
Erna Döring  
Klingelbergstrasse 11  
CH 4056 Basel

**Pagu al :** CHF 16,00  
Erna Döring, sama adreso.  
Poŝtkonto 40-43136-2

Laŭeble pagu al via peranto aŭ fakreferanto. Se tio ne estas ebla, vi pagu al la kasisto Eric Baert ĝirkonto 75 43 982 Postbank Nederland, nome de La Migranto, en Belgio. Vidu paĝon 1 de ĉi tiuj aldonfolioj.



Ni deziras al niaj abonantoj, legantoj kaj ĝeamikoj

feliĉan novan jaron 2005.

la TANEF komitato.

en la mondo. En la mineja regiono ĉirkaŭ Katowice en Pollando oni eksperimentas ekz.e per diversaj herboj kiuj povas kolekti la pezajn metalojn el la minejaj restaĵoj.



*Kolzo.*

Plantoj kiuj kreskas en tre malpurigitaj grundoj ĝenerale ne tiel bone kreskas kiel plantoj en "puraj" grundoj.

Kompreneble en nia epoko de bioteknologio oni pensas ankaŭ pri la ebleco pliiĝi la kvanton da genoj en tiuj plantoj kiuj jam povas akumuli toksajn substancojn. Genoj kiu kodaĵas por sentoksigaj mekanismoj, enzimoj, transportproteinoj, k.s. Tiel oni povus produkti superplantojn kiuj povas ankoraŭ pli efike purigi malpurigitajn grundojn. Kompreneble oni tiam povas bruligi la sekigitajn plantojn kaj "rikolti" la pezajn metalojn el la cindro. Oni jam eksperimentas pri tio, sed ĉu registaroj permesos, estas alia afero. Ĉiukaze estas interese el ekonomia kaj ekologia vidpunktoj, ĉar tiu perplanta purigado estas multe malpli kosta, dum oni preskaŭ ne damaĝas la

vivon en la grundo mem. La klasika kemia purigado aŭ bruligado kompreneble jes damaĝas la grundon.

Laŭ artikoleto en Volkskrant, 20a de novembro 2004. trad. B.de W.

### **Internacia Amikeca Esperanto-Renkontiĝo.**

Centjarigo de la unua Universala Kongreso de Esperanto de vendredo la 25a ĝis merkredo la 30a de marto 2005 en Boulogne sur Mer (Paskaj Festoj). Temo: Esperanto; perspektivoj post 100 jaroj de renkontiĝoj. Organizita de la Nordfranca Esperanto-Federacio

Informoj kaj aliĝoj: SAT-Amikaro, 134 boulevard Vincent Auriol, 75013 Paris, Francio. Rete: sat-amikaro@wanadoo.fr

### **SATEB, Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio,**

Semajnfino kaj jarkunveno, de la 13a ĝis la 15a de majo 2005 en Wedgwood Memorial College. La ĉi-jara gastpreleganto estos Atilio Rojas, direktoro de la internacia Esperanto-Instituto en Hago. Informoj kaj aliĝoj: The office Manager Wedgwood Memorial College, Station Road, Barlaston, Stoke on Trent ST12 9DG, Britio. Rete:

[Wedgwood.college@staffordshire.gov.uk](mailto:Wedgwood.college@staffordshire.gov.uk)

Tel(+44) 01782-372 105/373 427

## Elfo de la rozo

*de Hans Christian Andersen*

Meze en unu ĝardeno kreskis rozarbetaĵo, kiu estis tute plena de rozoj. En unu el ili, la plej bela el ĉiuj, loĝis elfo; li estis tiel neimageble malgranda, ke nenia homa okulo povis lin rimarki. Malantaŭ ĉiu folio de la rozo li havis dormoĉambron. Li estis tiel bone formita kaj bela, kiel nur povas esti infano, kaj de la ŝultroj ĝis la piedoj li havis flugilojn. Ho, kia bonodoro plenigis liajn ĉambrojn, kaj kiel klaraj kaj belaj estis iliaj muroj! Ili estis ja la palruĝaj, delikataj folioj de rozo. Dum la tuta tago li sin amuzadis en la varma sunlumo, flugadis de floro al floro, dancadis sur la flugiloj de fluganta papilio kaj mezuradis, kiom da paŝoj li devus fari, por trairi ĉiujn vojojn kaj vojetojn; kiuj troviĝas sur unu sola folio de tilio. Tion, kion ni en folio nomas vejnoj, li rigardadis kiel vojojn kaj vojetojn. Ili eĉ estis por li vojoj neme-zureblaj, ĉar antaŭ ol li atingis sian celon, la suno subiris. Li komencis sian migradon tro malfrue.

Fariĝis malvarme, falis la roso kaj leviĝis vento. Nun estis plej bone reveni hejmen. Li rapidis, kiel li nur povis, sed la rozo fermiĝis, li ne povis eniri, – eĉ unu rozo ne staris malfermita. La kompatinda malgranda elfo eksentis plej grandan teruron. Neniam antaŭe

li pasigis nokton ekstere, li ĉiam en la nokto dolĉe dormadis en la varmaj folioj de la rozo. Ho, tio devis fariĝi lia morto!

En la alia fino de la ĝardeno staris, kiel li sciis, laŭbo el belaj arbetoj de kaprifolioj. La floroj estis similaj al grandaj pentritaj kornoj; en unu el ili li volis enŝoviĝi kaj dormi ĝis la mateno.

Li flugis tien. Ts! tie estis du homoj; juna bela viro kaj ĉarme bela junulino sidis tie unu apud la alia kaj deziris, ke ili por ĉiam povu resti tiel kune. Ili tre amis sin reciproke, ankoraŭ pli multe ol la plej bona infano povas ami siajn gepatrojn.

“Kaj tamen ni devas disiĝi!” diris la juna viro; “via frato ne havas simpatian al ni, tial li sendas min kun komisiono tiel malproksimen trans montojn kaj marojn! Adiaŭ, mia dolĉa fianĉino; ĉar mia vi estas kaj restos!”

Ili kisis sin reciproke, kaj la juna knabino ploris kaj donis al li rozon. Sed antaŭ ol ŝi transdonis ĝin al li, ŝi metis sur ĝin kison, tiel fortan kaj koran, ke la floro malfermiĝis. Tiam la malgranda elfo enflugis en ĝin kaj apogis sian kapeton al la delikataj bonodoraj muretoj. Nerimarkite li tiamaniere estis atestanto de la amoplena disiĝo kaj sentis, ke la rozo estis metita sur la bruston de la juna viro. Ho, kiel forte batis

en ĝi la koro! La malgranda elfo tute ne povis ekdormi; tiel forta estis la frapado.

Tamen ne longe la rozo ripozis sur lia brusto; la juna viro ĝin elprenis, kaj, irante sola tra la malluma arbaro, li kisadis la floron, kaj li faradis tion tiel ofte kaj tiel forte, ke la malgranda elfo estis en danĝero esti dispremita. Tra la folio li povis tion senti, kiel brulas la lipoj de la viro, kaj la rozo mem malfermiĝis, kiel ĉe la plej forta tagmeza suno.

Sed jen venis alia viro, malserena kaj kolera. Tio estis la malbona frato de la bela knabino. Li eltiris tranĉilon, akran kaj longan, kaj dum la fianĉo kisadis la rozon, la malbona viro pikmortigis lin, detranĉis al li la kapon kaj enterigis ĝin kune kun la korpo en la molan teron sub la tilio.

“Nun li malaperis kaj estos forgesita,” pensis la malbona frato; “neniam li revenos. Li estis faranta malproksiman vojaĝon, trans montojn kaj marojn, tiel li povis facile perdi la vivon, kaj tiel okazis al li. Li ne revenos, kaj mia fratino neniam min demandos pri li!” Poste li kunŝovelis per la piedo velkintajn foliojn sur la disfositan teron, kaj en la maluma nokto li iris returne hejmen. Sed li iris ne sola, kiel li pensis: la malgranda elfo lin akompanis. Li sidis en sekiĝinta, ruliĝinta folio de tilio, kiu dum la superŝutado de la tombo falis al la malbona

viro sur la harojn. Ĉar tiu viro metis sur la harojn sian ĉapelon, tial sub ĝi fariĝis tiel mallume, ke la elfo de timo kaj de kolero pri la malbona ago forte tremis.

Ne pli frue ol matene la malbona viro venis hejmen. Li deprenis la ĉapelon kaj eniris en la dormoĉambron de sia fratino. Tie kuŝis la bela, floranta knabino kaj sonĝis pri tiu, kiun ŝi tiel amis kaj pri kiu ŝi pensis, ke li nun vojaĝas tra montaroj kaj arbaroj. La malbona frato kliniĝis super ŝin kaj ridis mallice, kiel nur diablo povas ridi. Tiam la velkinta folio el liaj haroj falis sur la litkovrilon, li tamen tion ne rimarkis kaj iris, por ke li mem iom dormu ankoraŭ en la matena horo. Sed la elfo elliberiĝis el la velkinta folio, enŝoviĝis en la orejon de la dormanta knabino kaj rakontis al ŝi, kiel en sonĝo, la teruran krimmortigon, priskribis al ŝi la lokon, kie la frato lin mortigis kaj enterigis lian kadavron, rakontis al ŝi pri la apude staranta floranta tilio kaj diris plue: “por ke vi ne pensu, ke tio, kion mi rakontis al vi, estas sonĝo, vi trovos sur via lito velkintan folion!” Kaj ŝi efektive ĝin trovis, kiam ŝi vekiĝis.

Ho, kiel maldolĉajn larmojn ŝi ploris, kaj tamen ŝi al neniuj povis konfidi sian malĝojon. La fenestro dum la tuta tago estis nefermita, tiel ke la malgranda elfo facile povus elflugi en la ĝardenon, al la rozoj kaj al ĉiaj aliaj floroj; sed lia koro ne permesis al li forlasi la

afliktiton. En la unua fenestro staris florbastono kun rozoj; en unu el ili li sidiĝis, kaj de tie li observadis la kompatindan knabinon. Ŝia frato de tempo al tempo venadis al ŝi en la ĉambron; li estis jen vigla, jen malbonhumora, sed ŝi ne kuraĝis diri eĉ unu vorton pri la malĝojo de sia koro.

Kiam fariĝis nokto, ŝi elŝteliĝis el la domo, elserĉis en la arbaro la lokon, kie staris la tilio, forigis la foliojn de sur la tero, fosis kaj trovis tuj la mortigiton. Ŝi ploris maldolĉe kaj petis Dion, ke Li ankaŭ ŝin baldaŭ prenu al si. Ŝi tre dezirus preni kun si la kadavron hejmen; sed tio ne estis farebla. Tial ŝi prenis almenaŭ la palan kapon kun la fermitaj okuloj, kisis la malvarman buŝon kaj elskuis la teron el la belaj haroj. "Ĉi tio restos mia!" ŝi diris; kaj metinte sur la senvivan korpon denove teron kaj foliojn, ŝi prenis la kapon kaj malgrandan branĉon de jasmena arbeto, kiu kreskis en la arbaro tie, kie li estis mortigita, kun si hejmen. Reveninte en sian ĉambron, ŝi prenis la plej grandan florpoton, kiun ŝi povis trovi; en ĝin ŝi metis la kapon de la mortinto, kovris ĝin per tero kaj poste plantis en la potu la branĉon de la jasmeno.

"Adiaŭ! Adiaŭ!" flustris la malgranda elfo. Li ne povis plu elporti la vidon de tiu malĝojo, kaj tial li elflugis en la ĝardenon al sia rozo. Sed ĉi tiu senfloriĝis; sur

la verda rozofrukto pendis ankorau nur kelke da paliĝintaj folioj.

"Ha, kiel rapide forpasas ĉio bela kaj bona!" ĝemis la elfo. Fine li denove trovis rozon, kiun li elektis kiel sian domon kaj inter kies delikataj bonodoraj folioj li de nun loĝis.

Ĉiun matenon li flugis al la fenestro de la kompatinda knabino, kaj ĉi tiu ĉiam staris ĉe la florpoto kaj ploris. Ŝiaj maldolĉaj larmoj faladis sur la branĉon de jasmeno, kaj ju pli pala ŝi fariĝis, des pli freŝa kaj pli verda fariĝis ŝia branĉo. Unu trunkido post la alia elkreskis, malgrandaj blankaj burĝonoj disvolviĝis en florojn, kaj ŝi kovradis ilin per kisoj. La malbona frato insultadis kaj demandadis, ĉu ŝi freneziĝis. Li ne povis tion elporti nek kompreni, kial ŝi ĉiam ploras super la florpoto. Li ja ne sciis, kiuj okuloj tie malaperis kaj kiuj ruĝaj lipoj tie fariĝis tero. Ŝi klinis sian kapon super la florpoton, kaj la malgranda elfo el la rozo trovis ŝin tiel dormetanta. Tiam li eniris en ŝian orelon, rakontis al ŝi pri la vespero en la laŭbo, pri la bonodoro de la rozo kaj pri la amo de elfoj. Ŝi songis tiel dolĉe, kaj dum ŝi songis, malaperis ŝia vivo. Kvietaj morto ŝin trafis, ŝi estis en la ĉielo ĉe li, kiun ŝi amis. Kaj la jasmenaj floroj malfermis siajn grandajn blankajn kloŝojn; ili havis mirinde dolĉan bonodoron; aliamaniere priplori la mortinton ili ne povis.



Sed al la malbona frato plaĉis la bela floranta arbeto, li prenis ĝin al si kiel heredaĵon kaj starigis ĝin en sia dormoĉambro tute apud sia lito, ĉar ĝi havis bonan aspekton kaj ĝiaodoro estis dolĉa kaj agrabla. La malgranda elfo el la rozo sekvis ĝin kaj flugis el unu floro al alia. En ĉiu el ili loĝis ja malgranda animo, kaj al ĉi tiu li rakontis pri la mortigita juna viro, kies kapo nun estas tero sub tero, rakontis pri la malbona frato kaj pri la kompatinda fratino.

“Ni tion scias, ni tion scias!” diris ĉiu floranimo, “ni tion scias, Ĉu ni ne elkreskis el la okuloj kaj el la lipoj de la mortigito?” Kaj ili mistere balancis la kapon.

La elfo ne povis kompreni ilian ŝajnan trankvilecon kaj elflugis al la abeloj, kiuj kolektadis mielon; li rakontis al ili la historion pri la malbona frato, kaj la abeloj raportis tion al sia reĝino, kiu ordonis, ke ili ĉiuj en la sekvanta mateno mortigu la mortiginton.

Sed en la antaŭiranta nokto – tio estis la unua nokto post la morto de la fratino, – kiam la frato dormis en sia lito, tute apud la odoranta jasmena arbeto, ĉiu florkaliko malfermiĝis. Nevideble, sed kun venenaj pikiloj, leviĝis la floranimoj, sidiĝis antaŭe ĉe lia orelo kaj rakontis al li malbonajn sonĝojn, kaj poste ili flugis trans liajn lipojn kaj enpuŝis siajn venenajn pikilojn en lian langon.

“Nun ni venĝis la mortinton!” ili diris kaj iris returne en la blankajn klosojn de la jasmeno.

Kiam fariĝis mateno kaj oni malfermis la fenestron de la dormoĉambro, la elfo kun la abelreĝino kaj kun la tuta abelsvarmo brue enflugis, por lin mortigi. Sed li estis jam senviva. Ĉirkaŭ lia lito staris homoj, kiuj diris: “Laodoro de la jasmeno lin mortigis!” Nun la elfo komprenis la venĝon de la floroj kaj rakontis tion al la abelreĝino, kaj ŝi zumis kun sia tuta svarmo ĉirkaŭ la florpoto. Oni ne povis forpeli la abelojn. Tiam unu homo forprenis la florpoton, sed unu el la abeloj pikis lin en la mano, tiel ke li elfaligis la florpoton, kaj ĉi tiu rompiĝis.

Tiam oni ekvidis la palan kapon de mortinto kaj komprenis, ke la mortinto en la lito estis krimmortiginto. La abelreĝino zurnis en la aero kaj kantis pri la venĝo de la floroj kaj pri la elfo de la rozo kaj pri tio, ke eĉ malantaŭ la plej malgranda folio loĝas iu, kiu povas rakonti kaj venĝi malbonagon.

*Hans Christiaan Andersen. Trad. Dr-o L.L.Zamenhof.*

### Du samtempuloj kaj iliaj heredaĵo

Hans Christiaan Andersen, la dana poeto/verkisto kaj fabelrakontisto naskiĝis la 2-an de aprilo 1805 en Odense (Danio) kaj forpasis en 1875 en Røghed

apud Kopenhago. Do baldaŭ estos antaŭ du jarcentoj ke li naskiĝis sed li tutmonde ne estis forgesita.

Kvankam li ne nur verkis fabelojn, ĉefe pri tiu-ĉi rakontoj li famiĝis. Ekzistas nun "Hans Chr. Andersen-fonduso" kiu klopodas priatenti la grandan verkiston. Unu maniero por fari tion estas pere de bonvolaj ambasadoroj kaj la instalado de honoraj geprotektantoj tutmonde. En la jubilea jaro speciale estas atento por la alfabetumado de la tuta terloĝantaro. Post la jubilea jaro tiu fonduso enfakiĝos al UNESKO. Ne estas hazardo ke tiu kapitalo ricevas la nomon de la dana verkisto. Li estis la filo de mairiĉa ŝuisto, liaj gepatroj eĉ ne havis rimedojn por sendi lin al iu lernejo. Li mem estis helpata pere de dana reĝa fonduso sed tiam li jam estis 17jara.

La dana reĝa familio nun promocias la tutmondajn festojn. En la festparko Tivoli en Kopenhago estos speciala baletto pri la fabelo "Tommeliso"; rakonto pri el lilio naskita knabineto, kiu estis kidnapita de ranoj.

La kreinto de Esperanto, naskita la 15-an de decembro 1859, tradukis plurajn Andersen-fabelojn en Esperanton. Honore al ambaŭ samtempuloj ni enpresigis unu el la de Zamenhof tradukitaj fabeloj. Kiel ofte, ne mankas teruraj okazintaĵoj sed krimo neniam estas profitiga. Okulfrapa

estas la simpla, klara vortelektio de Zamenhof. A.N.

### ANONCO.

Ni ricevis la sekvontan elvokon de NFI el Vieno por nova ĝenerala sekretario. La kialo por la frua foriro de Michael Procházka ni ne scias.


"Serĉata estas por la direkcio de la internacia buroo en Vieno: ĝenerala sekretario. La labora kampo enhavas la subtenon de la landaj federacio, laŭnhave kaj organize; la anstataŭigon de la landaj asocioj sur internaciaj terenoj laŭpete kaj krome la realigadon de publikaj kampanjoj en kunlaboro de la landaj asocioj. Oni atendas de la kandidat(in)o: sperton kaj bone informitan scion de la naturamika laboro; faksciencon pri protektado de la natura medio, daŭrigebla disvolvigo kaj turismo sur internacia tereno; sperton pri laboro en delegacioj, intern. NGO laboro. Bonega kono de la angla kaj germana lingvoj, kaj pri modernaj komunikadoj. Skriba sin proponado kun biografio kaj salajro-propono, vi sendu antaŭ la 28-a de februaro 2005 al: Präsidenten der Naturfreunde Internationale, Diefenbachgasse 36, A-1150 Wien."

(mallongita)

### Montarmigrada semajno 2005 en Grindelvaldo.

Kultura Centro Esperantisto organizos de lundo la 11a de julio (alveno dimanĉon) ĝis la mateno de la 16a de julio 2005, triafoje naturamikan semajnon en Grindelvaldo (Berna Kantono). La aranĝo, rezervita por efektiva amantoj de montarmigrado gvidas c-ano Fr. Degoul. Tranoktoj kaj matenmanĝoj okazos en la Naturamika Domo en unu- aŭ dutilaj ĉambroj. Eblas mendi vespermanĝoj aŭ mem kuiri. Informoj: KCE, c-ano Degoul, CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando Tel. (41) 32 9267407

## La birdoj en mia regiono.



### La blankgorĝa silvio : ( *sylvia communis* )

El la ordo de la paserformaj birdoj. Grizeca kapo, la flugiloj rustbrunaj, blanka gorĝo. La ventro malpurblanka, malgranda pinta beko. La virineto havas brunan kapon.

La blankgorĝa silvio daŭre aktivadas. Ekzemple sub heĝoj au arbustaro. Dume ĝi mallaŭte kantadas. Kelkfoje tamen ĝi subite vertikale flugas aeren kaj tre alte super la arbustaro ĝi laŭte

kantadas. Same subite ĝi rekaŝas sin sub la arbustaron. Kvazaŭ ĝi pro sia laŭta kantado teroriĝis.

Vidu PIV p. 1038, la lasta eldono.

### La sturno : ( *sturnus vulgaris* )

El la ordo de la paserformaj birdoj. La sturnoj estas tre bonaj imitantoj.



Dume ĝi akompanas sin per svingantaj flugiloj kaj vibrantaj kolplumoj. Nigrabrilanta plumaro kun verda kaj violblupurpura rebrilo. Dum la aŭtuno ĝi ŝanĝas la plumaron kun blankaj pintoj.

La pinta beko estas citronflava, dum la vintro bruna. Manĝas plantan kaj bestan nutraĵon. Parte restadbirdo, en severaj vintroj ili ĉiuj forflugos. Post la kovperiodo la sturnoj kolektiĝas per grandegaj grupoj en la vespero por kune

serĉi dormlokojn en arboj aŭ kanokampoj.

### La najtingalo : ( *luscinia megarhynchos* )



Fam. de turdedoj, kies kanto estas pli bela ol tiu de iu alia birdo. Migradbirdo. Kiam la virnatingalo revenas el tropika Afriko, ĝi tuj proprigas al si terenon. Tion ĝi faras tage kaj nokte per laŭta kantado. Post la alveno de la najtingalinoj ĝia kanto estiĝas vera amkantado !

La nesto estas kovforma kunmetaĵo en aŭ proksime al la tero el falintaj folioj kaj herbo, prefere inter urtikaro en arbaroj, parkoj kaj ĝardenegoj. Neokulfrapa, bruneca birdo kun flavruĝa


vesto. Sufiĉe ĝenerala aspekto.

**La pasero : (passer domesticus)**

Griza kranioĉapo, grizblankaj vangoj, bruna kaj griza dorso, la virpasero havas nigran bruston. La paseroj bone rilatas kun la homoj ĉar ĉe la homoj ĉiam estas io manĝebla. Ili ŝatas manĝi afidojn kaj kulojn. Restadbirdo. Longe ĝi estas la plej ofte troviĝanta birdo en Nederlando sed ekde oktobro 2004 la Birdprotektanta Asocio Nederlanda metis ĝin sur la novan ruĝan liston de minacataj birdspecioj. La nombro da dompaseroj malkreskiĝis ekde la jaro 1960 per 40 ĝis 50 procentoj ĉefe pro la nuntempa domkonstruo. Pro tiu oni nun vendas specifikajn tegmentajn tegolojn kun kavo en kiu la paseroj povos nesti. Vidu PIV p. 846, la lasta eldono.

**La griza muŝkaptulo : (musicapa striata)**

El la ordo de la paseroformaj birdoj. Trovebla preskaŭ ĉie en parkoj kaj ĝardenoj. Vi rekonas ĝin je la grizbruna dorso, la striita kranio kaj la rekta teniĝo. Ĉi tiun neokulfrapantan birdeton oni tuj rekonas pro ĝia konduto, sidanta vertikala sur branĉo aŭ drato, ĝi subite kaptas preterpasantan insekton kaj revenos al la antaŭa sidloko. Migra birdo, ĝi trapasas la vintron en la suda parto de la Sahara Dezerto. Ili nestas en kavaj arboj, en nestoj de aliaj kantbirdoj kaj en duon-malfermitaj nestkestetoj. Vidu PIV p.766, la lasta eldono.

**La troglodito: (troglodytus troglodytus)**

El la ordo de la paseroformaj birdoj: La trogloditojn vi rekonas per ilia suprenŝvinganta vosteto. Ĝi flugas mallongan distancon apud la tero kaj tio kaŭzas zuman tonon. La troglodito preskaŭ dum la tuta jaro kantas. Ĝi prefere kovas je ŝirmita loko, kiel sur arbustaro, hedero aŭ maljunaj arboj, ankaŭ en fendoj de muroj. Ĉefe restadbirdeto. La vireto konstruas pliajn nestojn kaj la ino elektas unu el ili, kiun ĝi tegas per plumetoj. En tia nesto ĝi metas 5 ĝis 8 ovojn. La ovoj estas blankaj kaj multfoje ruĝbrunaj makulitaj. Vidu PIV p. 1183, la lasta eldono.

Kolektis kaj tradukis Aat de Jong, Nederlando (daŭrigota)